


V-19479

Esperanto

Bulgara

ESPERANTISTO



2

1969

B. Leonov. Al sukcesa prezentiĝo en nia IX Festivalo!	1
M. Ŝekerĝiev. La vento	3
B. Kavalĝiev. Kanteto pri Esperanto	4
Popola kanto. Ho, kverko, kverko	4
* * * IX Festivalo de BEJ	5
I. Zahariev, C. Kolarov, T. Tonĉeva. Organiza vivo	6
K. Vălev. Esperanto konkeras la instruistaron en Sofia Distrikto	7
R. Georgieva, B. Kavalĝiev, A. Petrov, J. Zahariev. Zamenhofaj celebroy	8
T. K. — G. Orjahovica. Kion fari por ne vani ellerni Esperanton?	9
* * * Altrudo kaj diskriminacio lingva	9
* * * Biblioteko facile konsulebla	10
E. Loozits. Letero el Tasmanio	10
St. Mihalkov. Finlando — unu amika lando	11
T. Rajkova. Dek tagojn en Esperantujo	12
V. Mitev. „Flugas kanto tra la mondo“	12
L. Jevsejeva. Mielo	14
N. Tarakĉiev. Nia belega patrolando	16

Sur la kovrilpaĝo: La centro de Haskovo.
Kontraŭe — la Kulturdomo „Zarja“, kie okazos la inaŭguro de la IX Festivalo de BEJ kaj la konkursaj programoj de junuloj kaj studentoj.

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv. 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albania, SSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamatarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

LBANIO: Ing. Cefo Fico, R, Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.
ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.
KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2, Eindhoven.
RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukuresti 5.
SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162.
SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

AL SUKCESA PREZENTIGO EN NIA IX FESTIVALO!

Forpasis jam dek jaroj, de kiam laŭ propono de la iniciatemaj gestudentoj en Burgas kolektiĝis gejunuloj el kelkaj bulgaraj urboj por partopreni la Unuan Balon de Bulgara E-Junularo. Tiuj dek jaroj estis periodo de ĉiam pli altiĝanta nivelo de la junularrenkontiĝoj, kiuj el baloj transformiĝis en amase vizitatajn festivalojn de BEJ, okazintaj sinsekve en Plovdiv, Ruse, Varna, Stara Zagora, Dimitroŭgrad, Loveĉ, Kazanlâk. Nun antaŭ BEJ staras la granda tasko organizi bonege sian IX-an Festivalon.

La festivaloj estiĝis kulturaj festoj de nia junularo. Dum la festivaltagoj niaj gejunuloj prezentas variajn literaturmuzikajn programojn, por kiuj ili sin preparas longan tempon.

Partoprenante la oratorajn konkursojn la plej lertaj reprezentantoj de nia junularo manifestas sian lingvoscion kaj sian majstrecon oratori, kio sendube kontribuas por perfektigo kaj plialtigo de la lingvonivelo de nia E-junularo.

La festivaloj fortikigas la kontaktojn de BEJ kun neesperantistaj organizaĵoj kaj larĝigas la subtenon, kiun ni ricevas flanke de tiuj organizaĵoj. Al ĉiu estas bone konata la fakto, ke la festivaloj estas la plej amasaj aranĝoj de BEJ, en kiuj partoprenas jam ĉirkaŭ 1500 gejunuloj. Kompreneble, se ni ne ricevus helpon de neesperantistaj organizaĵoj surloke kaj helpon de la loĝantaro en la festivalurboj, ĉi tiuj niaj aranĝoj neniam povus esti tiel sukcesaj. La helpo kaj la subteno de la politikaj kaj amasaj organizaĵoj klare montras ties rilaton al ni, ties aprobon de nia agado.

La festivaloj estiĝas ne nur festoj de nia E-junularo, sed ankaŭ festoj de la tuta loĝantaro en la loko, kie ili okazas. La festivalurbo vivas dum tri tagoj kun la spiro de la festivalanoj, kun la riĉaj impresoj pri la variaj E-aranĝoj.

Niaj festivaloj kontribuas por la kultura plialtigo kaj patriotisma kaj internaciisma edukado de nia junularo, montras nian strebon al paco kaj amikeco inter la popoloj.

En la festivaltagoj ankaŭ okazas plenkunsidoj de BEJ, kie oni diskutas pri la agado dum la kuranta jaro, pri niaj sukcesoj kaj malsukcesoj.

Dum la lasta festivalo en Kazanlâk nia kara gasto estis studenta ensemblo de urbo Toruń — Pollando, kies programo lasis neforgeseblajn impresojn en ĉiuj festivalanoj.

Jam komenciĝis 1969 — jubilea jaro de nia libero. La tuta nia popolo vivas kun la deziro inde reprezenti sin kaj siajn sukcesojn okaze de la

glora 25-jara Jubileo. BEJ ankaŭ ne postrestas tiurilate: la plej gravaj kaj amasaj junulararangoj dum ĉi tiu jaro — la IX-a Festivalo kaj la III-a Internacia E-laborbrigado — okazos sub la signo de la Jubileo.

Do, kiaj estas la specifikaĵoj, kiujn ni devos havi antaŭvide ĉe nia preparo kaj partopreno en la IX-a Festivalo de BEJ en Haskovo?

Unue, ni devas turni grandan atenton al la programoj. Ili devas reprezentii nian gloran historion kaj ankaŭ la sukcesojn en la konstruado de la socialismo en nia lando, atingitajn dum 25 jaroj de libera vivo. Ni devas gvidi nian preparon laŭ la rekomendoj de Cirkulero № 1 de CK de BEA kaj la aprobita Festivalregularo. La Oratora Konkurso ankaŭ devas pasi pli altajn nivelojn kompare kun la antaŭaj festivaloj. Tre grava iniciato ĉi-jare estas la Literatura Konkurso, kiu okazos unufoje. Oni instigu la junajn talentojn vaste partopreni ĝin.

Havante antaŭvide la specifikon de tiu ĉi nia Festivalo, ni devas multe labori por inda reprezento, kiu sendube kontribuos por la plialtigo de la aŭtoritato de BEJ en nia lando kaj en la internacia E-movado.

Al fruktodona laboro, karaj geamikoj, por sukcesa prezentiĝo en nia IX-a Festivalo!

ДЕКАРТ ПРЕДСКАЗВА ЕСПЕРАНТО

PRI ESPERANTO

Първия чужд език, който бях научил след руския, беше есперанто. Обичам да чета на есперанто и особено оригинални работи, писани на тоя език. По характер той ми напомня романските езици. Той представя да бъде изкуствен език, защото хората пишат и говорят на него, чувствуват го и по тоя начин му вдъхват душа. Голямата лекота и безкрайните възможности за изразяване го правят най-модерно езиково средство за международни връзки. Вън от практическата полза той постига и висша хуманитарна цел — подпомага обединяването на хората в едно всемирно братство.

Емануил Пондимитров
български поет

Лайбниц, Волтер, Монтескьо, Навил, Коменски, Толстой, Максим Горки и много други умове, както е известно, в своите научни занимания и творчески търсения неминуемо са стигали и до мисълта за създаване на международен език, който да улеснява народите в ежедневно им общуване. Ето какво пише по този въпрос бележитият френски философ Декарт в 1629 г.:

„Като се създаде език, в който да има само един начин на спрягане, скланяне и образуване на думи, в който никоя дума да не бъде неправилна (което нещо е езиков недъг), и дори в който видоизменянето и постройката на думи е или на глаголите да става с представки или наставки, които ще се съдържат всички в речника, няма да бъде чудно, че даже простите умове ще се научат в по-малко от шест часа да пишат на тоя език с помощта на речника.“



Ĉu en la mondo ekzistas pli sperta pentristo ol mi — la vento? En la dezertoj mi pentras la reton de la dunoj kaj sur la marsurfaco — la sinsekvajn ŝaŭmantajn punktojn. Sur la blua ĉielo mi disjetas blankajn ĉifonojn de diversformaj nuboj, kiuj sin pelas kaj ŝanĝiĝas por plibeligi la pejzaĝon. Tiam sur la tero migras malhelaj ombroj samkiel nigraj papilioj. Ofte mi intence densigas la farbojn kaj la ĉielo tuj estiĝas plumbokolora kaj aŭguras ŝtormon.

Ne vane oni nomas min petolulo. Aŭtune mi ŝatas peli la falintajn flavajn kaj oranĝkolorajn foliojn, disigi kaj levi ilin supren, supren en senordo. Kaj vintre? Ho, vintre, dum neĝtempesto, mi dancigas la neĝerojn kaj siblas en la kamentuboj. Sur mia paletro troviĝas diverskoloraj farboj. Flugante tra la stratoj mia ruĝkolora peniko ruĝigas la nazetojn kaj la vangojn de la knaboj kaj ili kuras, kuras hejmen. Vespere, kiam la horizonto restas longtempe purpura, unu infano ekdemandos sian patrino:

— Panjo, ĉu morgaŭ vere blovos vento?

La patrino jesas kaj la infano ekdormos feliĉa, ĉar morgaŭ li flugigos sian kajton.

Kaj mi naskiĝas por disporti la aromon de la floroj kaj la herboj. La abeloj alflugos kaj suĉos nektaron el ili. Kiam la floroj estos pretaj, mi forportos iliajn stamenojn, polenon kaj sporojn por koncipigi la aliajn florojn kaj spikojn, ĉar mi estas fidela semisto de la naturo.

Oni diras: la vento estas kreisto kaj samtempe detruisto. Ili rajtas. Ĉar mi kreas la terurajn samumojn, la tajfunojn kaj la uraganojn, forŝiras la velojn de la fiŝistaj barkoj, levas en la aeron la tegmentojn de la domoj kaj la jupojn de la knabinoj kaj frakasas la fenestro-

vitrojn je centoj da pecoj. La homoj malbenas min, kiam mi disblovas la flamojn de la incendioj, frapigas kolere la marondojn al la rokaj bordoj aŭ kiel trombo disrompas milojn da pinoj en la arbaro. Mi venas kun la printempa ŝtormo malhumila, malobeema, senzorga kaj sovaĝa, ĉar tia estas mia naturo. Milfoje mi mortas kaj milfoje mi naskiĝas ree freŝa, forta kaj ribela.

— Nu, maljunulino, ne timu, reekdormu! Estas la vento, kiu frapas — trankviligas la avo sian avinon, vekiganta subite pro la fortaj batoj de la ŝutroj.

Mi regas en la maltrankvila spirito de Faŭsto, en la protesto kaj malhumileco de Prometeo, mi ardas en la furiozeco de la taŭro, fiksanta la ruĝan tolon kaj kolere jetanta sin antaŭen por morti pro la lanco de la pikadoro. Vi serĉu mian enmiksiĝon en la ribelo de la sklavoj, en la pasia ĵaluzo de la geamantoj kaj en la konvulsioj de la revolucioj, por ke ĉio putranta detruigu kaj naskigu io nova, pli vivema. La sklavoj prenas la pafilon kaj sindone batalas, la patrino invadas la brulantan domon por savi sian bebon, la abnegaciaj herooj mortas sur la bruleŝafodo por idealoj. Tio estas la homa vento, same furioza, same maltrankvila kaj sereniga.

Mi ludas sur la animaj kordoj samkiel sur arfo kaj forportas la homajn ĝojojn kaj malĝojojn for, for en la ĉielvaston. Mi eniras en la malgrandan kabanon kaj sekigas la larmojn de la suferantaj malriĉuloj. Ĉu vi vidas la sidantan sur la teraso maljunulon kun mornaj okuloj? La marbrizo ŝveligas lian ĉemizon kaj li murmuras apenaŭ aŭdeble:

— Estu benita, ho vento, vi, kiu foliumas la paĝojn de mia vivo kaj revenigas min al la rememoroj.

KANTETO PRI ESPERANTO

de Boris Kavalĝiev

Pulsas niaj koroj en la sama takto,
ĉar mirinde ligas ilin ĉi-kontakto —
la ideo nobla, alta kaj utila
de l'Internacia Lingvo plej facila.

Zamenhof genia kreis ĝin kuraĝe,
por ke la popoloj interkompreniĝu.
Kaj li donis al la simplaj ĝiaj vortoj
detruantan ĉiujn lingvajn barojn forton.

HO, KVERKO, KVERKO

Edziĝfesta popolkanto

Ho, kverko, kverko,
bluverda kverko,
kial vi, kverko,
verda jam velkas,
kaj mi, ho, kverko,
seka verdiĝas?
Kial ne esti
verda velkinta,
kial ne esti

vi verdiĝinta, —
sur mian korton
nebulo falas,
nebulo falas,
sun' malaperas.
Sur via korto
du sunoj brilas.

El bulgara: *Zefira Dimitrova*

Mi estas via amiko, amiko de ĉiuj homoj. Ĉu vi efektive konas min? Ne? Tiam haltu kaj aŭskultu la susuron de la arbara foliaro kaj vi komprenos mian muzikon kaj ekamos min. Vi ekamos min, kiam mi disblovos la blondajn buklojn de via amatino kaj ŝi, ferminte siajn palpebrojn, svenos pro viaj pasiaj kisoj. Vi ekamos min, kiam vi vidos kiel dolĉe mi dormigas la montarajn lagojn kun mirindaj flustroj kaj fabeloj. Vi ekamos min, kiam vi aŭdos kiel dum la kvietaj someraj antaŭvesperoj mi disaŭdigas la ritman melodion de la griloj, la ĉhon en montaroj kaj grotoj, kiuj brilas kun perlamotaj stalaktitoj kaj stalagmitoj. Mi alportas la varmon kaj la humidon al la ĵus naskitaj burgonoj de la branĉetoj kaj ili strebas alten al la suno.

La ĉasisto amas kaj malamas min. Ofte en la arbaro mi disaŭdigas la

krakadon de liaj nesingardemaj paŝoj, kaj la kapreoloj kaj la cervoj forkuras panike.

— Domaĝe! — elspiras la ĉasisto kaj malbenas min.

Ĉu la maristoj estos maristoj sen vento kaj ondiĝo?

— Ekblovis laŭvoja vento — diras la kapitano de la fregato kaj la ŝipanaro vigle preparas sin navigi.

Amu min, amu min samkiel mi amas vin! Ne forgesu kiel dum solenaj tagoj mi svingas la flagojn de via patrujo kaj igas vin pensi pri via nacio. Mi svingas la flagojn de ĉiuj nacioj kaj pensigas vin pri ĉio frata, kio kunigas ilin.

Mi blovas matene kaj vespere, tage kaj nokte. Mi blovas elsude norden, elokcidente orienten kaj inverse. Mia regno estas la valoj kaj la montaroj, la maroj kaj la oceanoj, la ĉielo, la tuta universo. Mi estas eterna. Amu min!



Nia JUNU- Laro

IX FESTIVALO DE BULGARA ESPERANTO-JUNULARO

El la „UNUA OFICIALA BULTENO“

La Organiza Komitato de la Festivalo invitas ĉiujn junajn esperantistojn: lernantojn, studentojn, laboristojn kaj oficistojn veni en nian urbon, situantan en la Trakia Ebenaĵo, en la piedoj de Orienta Rodopi-Montaro.

Eble vi, karaj geamikoj, interesigas pri antikvaĵoj? Haskovo estas malnova urbo kun postsignoj de loĝado jam en la ŝtonkupra epoko. Apud la urbo troviĝas la restaĵoj de mezepoka slavbulgara fortikaĵo de la X—XII jarcentoj. Kronologie la kvara legejo (kulturdomo) en Bulgario estis kreita en Haskovo dum 1858 kaj en 1872 la Apostolo de la Libero Vasil Levski ĉi tie fondis aktivan revolucionan komitaton. En la urbo estas vidindaj: la preĝejo „Sveti Arĥangel“ kun fajna lignogravurita ikonostazo — monumento de la bulgara renesanca arto, la muzeo, posedanta plej riĉan kolekton de mezepokaj ornamaĵoj kaj garnituroj, kaj multaj malnovaj domoj. La bataloj de la laborista klaso en Haskovo kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo estas montritaj en konstanta ekspozicio de la Urba Historia Muzeo.

Aŭ vi preferas la ekskursojn? En la belega apudurba arbarparko „Kenana“ vi povos promeni sub la ĵus ekflorintaj arboj, veturi per boato tra la lago, rigardi la bestojn en la arbara zooparko aŭ ripozi kaj pasigi agrablajn horojn en la restoracioj „Kenana“ kaj „Divoto Kozle“. En la suda parto de la urbo troviĝas la pitoreska „Junulara Altaĵo“,

el kiu estas videbla belega panoramo al la tuta urbo. Proksime de Haskovo troviĝas la famekonataj mineralakvaj banejoj kaj malantaŭ ili — la monto-supro „Aida“. Je 8 km nordokcidente de la urbo troviĝas la historia vilaĝo Klokotnica kaj la Asen-fortikaĵo, kie en 1230 la bulgara reĝo Ivan Asen II debatis la armeon de la epira despoto Teodoro Komnin. Je la kontraŭa flanko de la urbo troviĝas la prikantita de nia P. R. Slavejkov Fonto de la Blankpiedulino. Norde de Haskovo je distanco de 16 km situas la urbo, naskito de nia socialisma konstruado — Dimitrograd, centro de kemia, cementa kaj ŝtonkarba industrioj. Iujn el tiuj lokoj vi povos viziti dum la organizotaj festivalaj ekskursoj.

Efektive dum la Festivalo vi povos trovi gajajn amuzojn kaj seriozajn okupojn. Ne nur la junularo, sed ankaŭ la tuta gastama loĝantaro de la urbo sincere vin invitas kaj atendas. Kaj ni klopodos fari ĉion de ni dependantan por via akceptado kaj gastigado ĉi tie, por ke la tri festivalaj tagoj restu neforgeseblaj por ĉiam.

Organiza Komitato



Haskovo — la festivalurbo

En 1933 j. en v. Gabarevo, distrikto de Stara Zagora, estis fondita E-Societo „D-ro L. L. Zamenhof“. Pro la Dua Mondmilito la Societo ĉesigis sian agadon. Longe post tio ĝi ne montris viglecon. Apenaŭ je la 24-a de novembro 1968 j. ĝi estis restarigita. Tio okazis en speciala kunveno, antaŭ kiu parolis gekdoj Georgi Kovačev, maljuna esperantisto,

Hr. Ĉumakov, P. Jordanov, J. Koev, Nestorova kaj Ivan Zahariev, reprezentanto de la DK. Ĉiuj esprimis sian grandan ĝojon pro tio, ke en Gabarevo denove komenciĝas organizita E-agado. Oni anoncis, ke en la vilaĝo jam funkcias elementa E-kurso kun 30 partoprenantoj, gvidata de k-do Jordan Koev, instruisto. La loka organizaĵo de Komsomolo disponigis sian klubejon por la kursaj lecionoj.

Iv. Zahariev



ANASTASIA M. BAKLAROVA

NOBLA FARO — ADMIRINDA, IMITINDA!

Nia malnova s-ino **Anastasia Miĥalčeva Baklarova** el v. Gabarevo, distrikto de Stara Zagora, donacis al la loka Popola Soveto kaj la loka E-societo ĉion, kion, ŝi ricevis herede de sia mortinta frato d-ro Todor Baklarov, ankaŭ esperantisto. Dank' al tio la E-societo „D-ro L. L. Zamenhof“ en v. Gabarevo ricevis sumon de 2000 levoj, kiu helpas ĝin por konstruado de propra klubejo.

Bonkora homo kaj fidela esperantistino, Anastasia Baklarova donis brilan ekzemplon al ĉiuj geesperantistoj. Tutkoran dankon!

eniris: Trifonka Borisova — prezidanto, Marie Hélène Bourdier — vicprezidanto, Margarita Slavčeva — sekretario, Tošo Todorov — kasisto, Rangel Rangelov kaj Maria Dečeva — membroj.

C. Kolarov

JARAJ KUNVENOJ

Svištov. La Studenta E-Societo „Aleko“ havis jaran kunvenon je la 16. XII. 68. En la estrara raporto, tralegita de la prezidanto Vasil Vladimirov, estis substrekte, ke la forpasinta jaro estis sukcesplena por la Societo: multaj ĝiaj membroj partoprenis la 37-an Kongreson en Varna, la Mondfestivalon en Sofio, la III studentan konferencon en Ruse, E-tendaron en Pollando, la III STELO-Kongreson en Francio; dum la somero kune kun la studentoj el Ruse estis organizita E-tendaro en v. Borima. En la nova estraro

Jambol. Je la 22. XII. 68 okazis la jarkunveno de E-Societo „M. Gorkij“. K-do Dimo Trudoljubov tralegis la estraran raporton. Li montris sukcesojn en la varbado de novaj membroj kaj abonantoj de E-gazetoj, en la instruado de E-to — en la momento funkcias 5 kursoj por komencantoj, 1 por progresintoj. La diskutojn partoprenis N. Kamburov, G. Stojanov, G. Jordanov, G. Bogdev, K. Kavargikov, Ĉ. Pančev, St. Panajotova k. a. Antaŭ la esperantistoj el Jambol staras grava tasko: organizi bone celebradon de la 60-jarecon de S-to „M. Gorkij“ fine de 1969 j.

T. Tončeva



ESPERANTO KONKERAS LA INSTRUISTARON EN SOFIA DISTRIKTO

La 10-an de januaro 1969 j. komenciĝis speciala kurso de Esperanto por ĝeinstruistoj el la Distrikto de Sofia. Ĝi estas organizita laŭ iniciato de Distrikta Popola Soveto — Fakto „Popola Instruado“, Distrikta Komitato de Unuiĝo de la Bulgaraj Instruistoj kaj Distrikta Komitato de Bulgara E-Asocio. La malfermo okazis en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“. Salutojn prezentis k-do Penkov — inspektoro ĉe Fakto „Popola Instruado“. Li bondeziris brilajn sukcesojn al la ĝekursanoj. Entute ĝis tiu ĉi momento aliĝis al la kurso 107 ĝeinstruistoj, lernejdirektoroj kaj inspektoroj. Gvidanto — Kunĉo Vălev, lektoro de Esperanto, en la Sofia Universitato.

Kelkaj specifikaĵoj en la preparo kaj la organizo de la kurso faras ĝin preskaŭ unika en la historio de Esperanto. Ĝi estis organizita post energia laŭplana laboro fare de la Distrikta E-Komitato, ĉiam kun la helpo de la Distrikta Fakto „Popola Instruado“. Plej gravaj momentoj en tiu preparlaboro estis: unue — speciala letero el la Distrikta Fakto „Popola Instruado“ al ĉiuj lokaj faktoj kaj lernejdirektoroj pri la celo kaj la kondiĉoj de la kurso; due — kelkaj dekoj da kunvenoj en la lernejoj de ĉiuj pli grandaj loĝlokoj de la Distrikto. En tiuj kunvenoj spertaj samideanoj klarigis la esencon de la problemo pri Internacia Lingvo kaj alvokis la ĝeinstruistojn partopreni la kurson.

Se ni parolas pri ĝia strukturo, ni devas atentigi unualoke pri la jeno: la kurso prezentas trafan kunigon de forestaj kaj ĉeestaj lecionoj. La lektoro preparas ĉiumonate 4 lecionojn kaj oni sendas ilin stencilite al la ĝekursanoj. Tiuj ĉi plenumas du kontrolekzercojn ĉiumonate kaj sendas ilin al la centro, kie ili estas korektataj kaj resendataj al la ĝekursanoj.

Fine de la monato ĉiuj kolektiĝas en Sofion kaj sub la gvidado de spertaj E-pedagogoj havas dutagajn ĉeestajn lecionojn.

Se similaj ĉiumonataj kolektiĝoj estas afero malfacila en tutlanda skalo, sur la teritorio de unu distrikto ili estas tute facile realigeblaj. Tiamaniere riceviĝas unu miksita formo de instruado — kombinaĵo el forestaj kaj ĉeestaj lecionoj. Tiu miksita formo permesas al ĝeinstruistoj el ĉiuj specoj kaj gradoj de lernejoj eĉ el plej malproksimaj kaj malgrandaj loĝlokoj de la distrikto formi aktivan lernotuton.

Dua'oke: en la plano de DK staras la tasko, dum la somera ferio organizi 20-tagan ĉeestan kurson por la samaj ĝekursanoj, kiu kurso finiĝos per ekzamenoj por instrurajto de Esperanto.

Ni ne dubas, ke tiu laborformo — miksita kurso dum la lernojaro, sekвата de ĉeesta kurso dum la somera ferio, donos eblecon al la Internacia Lingvo penetri eĉ en plej malgrandajn vilaĝojn kaj vilaĝetojn, por trovi tie la sciaman spiriton kaj noblan koron de la instruisto, kiu laŭ destino kaj devo efektivigas la ekskluzive respondcan aferon de klerigo kaj edukado de la juna generacio en socialisma spirito, en spirito de arda patriotismo kaj alta internaciismo. Ĝuste Esperanto donos al la instruisto kaj liaj ĝelernantoj novajn eblecojn por vastaj kontaktoj



ZAMENHOFAJ CELEBROJ

Multloke en la lando oni celebuis solene la 109-an datrevenon de la naskiĝtago de nia kara Majstro.

Pazarĝik. Pri la vivo kaj agado de Zamenhof bonege prelegis k-ino Svetla Ŝiškova. K-do Petko Arnaudov parolis pri la homaj rajtoj. Estis belarta programo.

R. Georgieva

Ruse. Pri la genia kreinto de E-to parolis nia E-veterano d-ro Zahari Bočev el v. Dve Mogili. Bonegan kaj tre interesan raporton faris ankaŭ la E-veterano k-do Vladimir Georgiev je temo „La historio de la E-movado en Ruse kaj ĝia regiono“. Du jarojn li laboris, kolektis multan materialon kaj per sia raporto grave kontribuis por klarigo de la pasinteco de Esperanto en tiu grava centro de nia Movado.

B. Kavalĝiev

Vilaĝo Radievo, distrikto de Haskovo. La 16. XII. 68 E-societo „Impeto“ organizis kun-

venon celebre al la 109-a naskiĝtago de Zamenhof, kiun ĉeestis 35 geesperantistoj. Parolante pri la lastaj sukcesoj de la loka E-Societo „Impeto“, ĝia prezidanto k-do Angel Petrov menciis, ke en la vilaĝo bone funkcias 2 E-kursoj — unu por civitanoj kaj alia por lernantoj, gvidataj de Ivanka Angelova kaj Kinka Vâlčeva (instruistino). Interese parolis antaŭ la kunveno pri siaj impresoj el multfojaj veturadoj tra eksterlando per la helpo de E-to k-do Vlado Vâlčev, reprezentanto de la Distrikta E-Komitato. Fine li honorigis per la insigno de CK de BEA 3 sindonajn longjarajn aktivulojn: A. Petrov, M. Ivanov, K. Vâlčeva.

A. Petrov

Kazanlâk. Prelegon pri Zamenhof faris k-do Ivan Zahariev. Solene oni enmanigis la honorinsignojn de BEA al meritaj longjaraj esperantistoj.

I. Zahariev

El la aŭtuna plenkunsido de la Distrikta Komitato de BEA—Sofio



kaj ligoj kun eksterlandaj kolegoj kaj lernantoj kaj ĝenerale kun homoj el aliaj landoj kaj popoloj, por altigi la senton de egaleco inter la nacioj, de solidareco kun la batalantoj por nacia libero kaj socia justeco, por paco kaj feliĉo en la tuta mondo.

Ni kredas, ke la bona sperto de Sofia DK vekos intereson multloke en nia lando kaj ankaŭ en eksterlando. Ĝi montras trafan kaj certan vojon.

K. Vâlčev



La ellernado de iu ajn lingvo ne estas facila afero. Sendepende de tio, ke Esperanto estas la plej facila el ĉiuj lingvoj en la mondo, ĝia ellernado postulas tempon, persiston kaj helpon, ĉar eĉ la plej simpla lingvo havas siajn detalojn kaj subtilaĵojn, sian manieron de ekposedado.

Estas esperantistoj, kiuj de la sama komenco tre fervore eklernas Esperanton, sed poste preskaŭ forgesas sian amon al ĝi. Ili perdas la kontakton kun la Movado kaj lasas siajn sciojn rustiĝi. Aliaj dronas en novajn interesojn kaj ne povas trovi tempon por doni pluan kontribuon al Esperanto.

Jen kiel eĉ de la sama komenco, kiam oni eklernas Esperanton, oni devas ekvivi kun la grandega ideo pri la tutmonda komprenilo. Tiu ĉi ideo devas kapti solide la homajn korojn kaj animojn. Do ĉiuj, kiuj estas konvinkitaj pri Esperanto, devas dediĉi sian energion por la progreso de Esperanto kaj labori por ĝi senlace kaj sindone ĝis la fino de sia vivo. Ĉiuj devas ellerni bone la gramatikon kaj ĉiutage tralegi ion en Esperanto. Tion oni povus atingi unualoke per niaj esperantaj literaturo kaj gazetaro, kiuj devas esti niaj ĉiutagaj kunuloj. Neniam oni

devas ne uzi okazon por praktika utiligo de la lingvo. Memlernado kaj sistema legado donas bonegajn rezultojn. Laŭ tiu maniero multaj malnovaj kaj perfektaj esperantistoj lernis la lingvon aŭtodidakte.

Tiaj elstaraj esperantistoj estas ankaŭ en nia bulgara E-movado. Ilia longjara agado superas eĉ pli ol 50 jarojn kiel Atanas D. Atanasov (Ada), Asen Grigorov, Atanas Lakov k. m. a. Pli ol 50 jarojn ili restis fidelaj al nia lingvo kaj movado. Ili dediĉis la tutan sian konscian vivon al la idealo pri paco kaj interpopola fratiĝo. Ni ne povas ne esprimi al ili nian sinceran dankon. Des pli, ke ili instruis al ni Esperanton ne nur por interŝanĝo de poŝtmarkoj kaj ilustritaj kartoĵoj, sed ĉefe por batali kontraŭ la muroj de malkompreno kaj malamo, starigitaj inter la popoloj de la regantaj klasoj. La ekzemplo de tiaj fidelaj adeptoj de Esperanto lumigas nian vojon antaŭen. Ili estas sindonaj kaj obstinaj, plenaj de kredo en la hela estonto de Esperanto serve al la homaro, al la paco.

Ankaŭ ni devas esti tiaj por ne vane ellerni Esperanton.

T. K. — G. Orjahovica

ALTRUDO KAJ DISKRIMINACIO LINGVA

La granda farso aŭ la imperiismo de la angla

Ke tio estas nenio nova por ni, esperantistoj, ja estas vero, sed ĉi tie ni donos plian pruvon.

La Mondaj Ĉampionadoj de Aerobatikado okazas ĉiun jaron en la lando, kiun fiksas la Federacio de Aeronautiko Internacia, kaj kunlaboras por ĝia realigo la Nacia Aero-Klubo tiea. La oficialaj lingvoj de tiu Internacia Or-

ganizaĵo estas la franca, la angla, la hispana kaj la rusa. Tamen ofte la informoj estas donitaj nur en la angla kaj en la lingvo de la lando gastiganta. Tiam oni povas sin demandi: por kio taŭgas la oficialigo de la aliaj tri lingvoj?

Laŭ Hispana E-Instituto

TRA LA



MONDO

**BIBLIOTEKO FACILE
KONSULTEBLA**

Unu el la tri plej grandaj Esperanto-bibliotekoj en la tuta mondo troviĝas en la domo de UEA en Rotterdam: la renoma Biblioteko Hector Hodler. Tiu kolekto, ĉiam pli kompletiganta, estas aparte valora ĝuste pro sia situo ĉe la koro mem de la monda Esperanto-organizaĵo. Aliflanke, pro la unikeco de multaj volumoj kaj pro la granda risko de perdo, ne estas eble elsendi librojn prunte el la biblioteko.

FOTOKOPIOJ AĈETEBLAJ

Nun prezentiĝas nova ebleco. La ĵusa instalado de fotokopia aparato en la Centra Oficejo de UEA signifas, ke de nun estos eble mendi fotokopion de kiu ajn teksto serĉata. Ĉu vi volus scii, en kiu formo aperis iu vorto en la plej fruaj vortaroj de nia lingvo? Ĉu vi serĉas forgesitan poemon de Baghy aperintan en iu revuo? Ĉu vi bezonas iun teknikan glosaron por la kompilado de nova terminaro? Aŭ eble vi volus scii, kiel aspektis spesmilo? De nun vi povos ricevi ĉe UEA malmultekostan fotokopion de la serĉata informo. Oni nur skribu kun kiel eble plej precizaj indikoj al: Biblioteko de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2. Fotokopio en la formato A 4 (210×297 mm) kostas nur 0,50 gld.

Informa Servo de UEA No 5/1968



E-kurso por geinstruistoj en Kargali gvidita de Neojanko Bojagiev

LETERO EL TASMANIO

Mi estas filatela delegito de UEA en Hobart, Tasmanio (Aŭstralio). Kun mia edzino Erika jam dek jarojn mi laboras por la skandinavia marista misio. Dum decembro mi vizitis la unuan bulgaran ŝipon „Buzluĝa“, kie mi vendis al maristoj novajn poŝtmarkojn, poŝtkartojn, kalendrojn, memoraĵojn, tukojn, bumerangojn ktp. Mi diris al la maristoj, kiel malfeliĉaj ili estas, ĉar ili parolas nur la bulgaran lingvon. Mi montris la UEA-jarlibron, informis ilin pri delegitoj, Esperanto kluboj, societoj, gazetoj ktp. La maristoj havis intereson kaj promesis lerni Esperanton. Bonvolu helpi min, sendu al mi nacilingvajn lernolibrojn, nacilingvajn esperantaĵojn propagandaĵojn, stampilojn ktp. al mia adreso.

Pli malfrue mi invitis kelkajn bulgarajn maristojn en la hejmon de miaj ukrainaj geamikoj kaj ankaŭ al mia propra hejmo. Unu maristo diris, ke lia 14-jaraĝa filino kiel filatelistino certe lernos Esperanton por daŭrigi la kolektadon de poŝtmarkoj, ĉar nia kara Internacia Lingvo malfermas la mondon eĉ al filatelistoj. Mi parolis pri Esperanto al la bulgaraj maristoj en la rusa lingvo.

*Elna Loorits, 240 Bathurst strato
Hobart, Tasmanio, Aŭstralio*

EKSPOZICIO DE INFANDESEGNAĴOJ EN LATVIO

En Latvio oni aranĝos ekspozicion de infandeseĝnaĵoj pri temo «La infanoj de la tuta mondo bezonas pacon!» Esperantistaj infanoj, kursgvidantoj, instruistoj, E-societoj bonvolu helpi al tiu entrepreno. La ekspozicio okazos de 17 ĝis 24 de majo 1969. La malfermon de la ekspozicio partoprenos ankaŭ Riga Televido. La aranĝantoj de la ekspozicio esperas ricevi almenaŭ 1000 infandeseĝnaĵojn. Ĉiu desegnaĵo devas havi Esperantlingvan surskribon, nomon de la lernejo, klason, hejman adreson, aĝon de la lernanto. Sendu ĉion al: Arturs Kubulnieks, Kr. Baronn 4-2, Alukane, Latvio, USSR.



Apenaŭ ekzistas homo, kiu vizitis Suomi-landon neeksentinte ĝian ĉarmon. Iuj vidas ĉarmon en la naturo — seninterrompa sinsekvo de ĉielbluaj lagoj kaj verdaj pinarbaroj. La finnoj diras, ke ili ne povas vivi, se de la fenestro de sia domo ne vidas bordon de lago; ankoraŭ pli ĝustadire: la finno ĉiam loĝas ĉe bordo. En tiu ĉi frazo sonas io neeldirita, sonas poezio.

Sed ŝajnas al mi, ke plej grandan ĉarmon portas la homoj de tiu lando. Ni interparolis kun politikaj kaj ekonomiaj agantoj, kun laboristoj kaj specialistoj, kun kreintoj de spiritaĵoj. Kaj ĉiam la interparolo komenciĝis tiel, ke unue ni parolis pri Bulgario. La ministro de la klerigo jam ĉe la manpremo diris: „Multe plaĉas al mi viaj montoripozejoj“. La komerca direktoro de la firmao por produktado de papero „Enso-gutcajn“ Hari Torenberg akceptis nin ridetante: „Nur antaŭ unu semajno mi revenis de Bulgario“!

Konstante oni diras al mi, ke ni havas famajn kantistinojn, iuj estis aŭskultintaj ilin en la Scalo di Milano, aliaj en Vieno, en Londono; ke ni havas bonegajn futbalistojn (oni memoris la venkon super Svedio en kvalifikaj renkontoj por monda ĉampioneco). La verkisto Marti Larni estis entuziasmigita de niaj kantfestivaloj: „Mi ne povas ne estimi popolon, kiu tiel respektas sian kulturon!“

Kaj ĉiam okazis tiel, ke kiam ni parolis kelkajn horojn je temo „Bulgario“, poste oni respondis al niaj demandoj. Sed por ke ne okazu iu miskompreno, post tio en la hotelo ni ricevis konvenan literaturon pri ĉio, kio nin interesis.

Kaj estas malfacile diri, kiam oni ekkonis Finnlandon. kiam oni estis tie, aŭ poste, kiam oni estas traleginta tutan valizon da libroj, alportitajn de

Helsinki. Antaŭ mi troviĝas prospektoj kun koloraj fotoj kaj diagramoj pri la finna papera, mebla kaj naftoprodukta industrio; antaŭ mi kuŝas reproduktaĵoj de bildoj de p'ej famaj finnaj pentristoj: Akseli Gallen Kallela, Hugo Simberg, Magnus Enskel. . . La finno fieras per Aleksis Kivi, kiu laŭ motivoj de ilia nacia eposo „Kalevala“ verkis la unuan dramon en finna (ne en sveda lingvo!); li estas ilia klasikulo en la literaturo, kaj liaj bustoj ofte renkontiĝas en la stratoj de la urboj, la poeto Eino Leino estas la alia verkanto en la sfero de la literaturo; lian nomon oni tre ofte mencias — krom la 30 volumoj da versaĵoj li tradukis en finnan ankaŭ „La Dian Komedion“ de Dante Alighieri, grandan parton el la verkaro de Goethe kaj Schiller; treege respektata



estas la komponisto Jan Sibelius, kies verkaro estas serioze influata de la eposo „Kalevala“ kaj la antikva finna mitologio...

Kompreneble, pri la intelektuloj de tiu lando oni povas paroli multe. Estas tamen unu bela vero — la nuntempa finno adoras ilian verkaron, povas reciti tutajn fragmentojn de apartaj iliaj verkoj. Tiu nuntempa finno heredis ilian humanecon kaj ilian strebadon, ke

Suomi montru al la mondo sian spiritan aspekton, siajn kreaĵn eblojn — en la sfero de materiala kaj spirita kulturo. Sed ĉiam ĉe unu kondiĉo — estimante la valorajn kvalitojn de la ceteraj popoloj, Eble tio estas la kaŭzo, ke ili tiel estimas nian landon Bulgario kaj senĉese nomas ĝin „amika“. Jen pro kio mi tre deziras respondi per la samo: „Amika Finnlando“!

El bulgara: V. Vasileva

DEK TAGOJN EN ESPERANTUJO!

Grandega, tute plata ebenaĵo sudoriente de la hungara Alfjöld, kie somere fariĝas tre varme kaj vintre — oni diras — ege malvarme. Laŭ legendoj, tie ĉi Atila starigis sian tendaron, de la sama loko li sin ĵetis al Romo kaj ĉiufoje tiu „dia vipo“ revenis al tiu ĉi loko. Laŭ la legendo, lia korpo estis enterigita ĉe en la fluejo de Tisa en triobla ĉerko el oro, argento kaj fero.

Tie ĉi sur la stepo ambaŭflanke de Tisa etendiĝas urbo Szeged. Ĝiaj antikvaj stratoj rakontas sian longan historion. Ili serpentumas kaj plektas labirinton, en kiu konserviĝis la romantiko de antaŭlonge travivitaj tagoj, de forpasintaj eventoj. Ĉio ĉi estas je dispono de la esperantistoj jam en la unua tago de ilia restado en la urbo.

La surprizo, kiun la urbo alable kaj riĉe proponas, estas la sincera amikeco. Jam kvinan jaron la esperantistoj el Szeged estas dommastroj de la Internacia Pedagogia Esperanto-Seminario. Kvinan someron la verda stelo

kunvenigas tien ĉi esperantistojn el ĉiuj landoj. Stimulitaj de la ideo „Esperanto — lingvo de paco kaj amikeso inter la popoloj“, ili kreas sur tiu ĉi loko esperantistan angulon.

„La loĝantoj de Szeged estas fierajo de mia nacio“ — diris L. Košut. Kaj ni aldonos: la loĝantaro en Szeged estas fierajo por la E-movado, por la E-literaturo. Pri tio nin konvinkas la riĉa E-biblioteko en la urba muzeo. Szeged estas naskiĝurbo de la mondkonata E-poeto Julio Baghy, kiu gloris la ideojn de Esperanto per sia poeta liro. Sian estimon kaj dankon al Baghy la esperantistoj esprimis per starigo de memorplado antaŭ lia domo.

Nun ni iru tien, kie oni disdonas E-literaturon, kie junuloj kaj plenaĝuloj komencas silabi ABC.

Antaŭ vi estas grupo „A“ kun gvidanto Balazs Ricsel. Ĝi estas diverskolora kiel laŭ sia nacia, tiel laŭ sia aĝeca konsisto. Al tiu grupo apartenas 16-jara knabino N. el Berlino.

! (daŭrigo sur p. 13, meze)

NI RECENZAS

FLUGAS KANTO TRA LA MONDO, kantaro. Kunmetis J. Markov, St. Kiraĝiev, D. Terziev kaj N. Nikolov. Muzikredaktoro C. Kolev, liter. redaktoro A. Grigorov. *Ŝtata Eldonejo „Nauka i Izkustvo“*, Sofio, 1968, 70 p., 1/16 de 62/92, broŝ., eldonkvanto 4100, prezo 1,41 lv.

La plej karakteriza specifaĵo de la kolekto, laŭ mi, estas la kompetenta elekto de la kantoj. Nefoje ĝis nun al ni oni proponis kantojn aŭ tre malfacilajn por amasa kantado, aŭ kun trivialaj melodioj kaj malbonaj, eĉ stultaj tekstoj. Ofte la tiel karakteriza por Esperanto akcento (sur la antaŭlasta silabo) ne estis konforma al la melodio. Pro tio jam de la unuaj pagoj de la kolekto „Flugas kanto tra la mondo“ mi konvinkiĝis,

ke la plej grava strebo de la kunmetintoj kaj de la muzika redaktoro estis elekti bonajn, gravajn laŭ signifo kantojn: „La Espero“, „La Internacio“, „Himno de la demokratia junularo“, „Estu ĉiam la suno“, „Buhenvalda sonoro“ kaj ma. Gravan parton okupas la bulgara popolkanto, kiu estas reprezentata de kelkaj el la plej karakterizaj modeloj. La plimulto de la proponitaj bulgaraj kantoj — revoluciaj, partizanaj, lernejaj k. a. — estas verkoj de niaj elstaraj komponistoj Panajot Pipkov, Dobri Ĥristov, Ljubomir Pipkov, Filip Kutev, Paraŝkev Ĥaĝiev, Todor Popov, Aleksandr Rajĉev k. a. Krom tio, la kolekto enhavas kantojn de Franz Schubert, Frederick Silcher, Anatolij Novikov. Por unua fojo la esperantista mondo



KURIOZAJ FAKTOJ

SEKAJ PLUVOJ

La klimato de la dezertoj estas ne kutime kontinenteca, la aero tie estas neordinare seka. Tial la nuboj en la dezertoj estas malofta fenomeno, kaj ankoraŭ pli malofte pluvas. Tamen eĉ kiam tio okazas, la pluveroj ordinare vaporigas en la aero, ne atingante la supraĵon de la tero. En tiaj okazoj oni povas vidi, kiamaniere pluvas — vi staras sub la pluvo, sed restas tute seka. Tio estas „seka“ pluvo.

Hungara Esperanto-Asocio organizos Internacian E-Ekspozicion de Infandeseĝnaĵoj inter la 24-a de majo kaj la 15-a de junio 1969 en Budapeŝto.

La Ekspozicion povas partopreni ĉiuj infanoj ĝis 14-jara aĝo, el la tuta mondo, kiuj lernas Esperanton.

La temo de la Ekspozicio estas: **LA LUDO.**

La desegnaĵojn oni devas sendi sur 30×40 centimetra desegnapapero kaj kun la desegnoj la esperante skribitan anonciĝon de la konkursanto.

Ni petas ĉiun konkursanton, bonvolu afranki la koverton per maloftaj poŝtmarkoj. La koverton kaj la leteron ni samtempe ekspozicios kun la desegnaĵo.

La plej bonaj desegnaĵoj estos distingitaj per altvaloraj premioj.

La infanoj alsendu la desegnojn ĝis la 1-a de majo 1969 al la jena adreso: **Johano Ingusz, lerneja direktoro, XIII Tomori u. 2, Budapeŝto, Hungario.**

75-aĝulino B. el Leipzig, esperantistoj el Hungario, Bulgario, Pollando, Rumanio, Italio k. a. ili studas elementan kurson de E-gramatiko.

Kaj jen estas la grupoj „B“ kaj „C“. En ili studas estontaj E-kursgvidantoj. Tio estas la tiel nomata kurso por progresintoj, kie oni traktas la problemojn de la esperantaj gramatiko kaj literaturo. Tie ĉi kun profesia majstreco kaj pedagogia lerteco legas siajn lekciojn de gramatiko la profesoro de la Budapeŝta Universitato d-ro Istvan Szerdahelyi,

de literaturo — la profesoroj Alfonz Pechan kaj d-ro Tibor Szabo.

Ekestas ankaŭ lernejaj tremoj kaj emocioj, kiam ĉiu devas montri la gradon de siaj atingadoj. Dum la ekzamena sesio fariĝas neordinare vigle. Tio estas la lastaj horoj en Esperantujo kaj sonas nur „la lingvo kreita por ĉiu naci“.

Dek tagojn en Esperantujo! Dek tagojn de krea atmosfero, amikaj renkontiĝoj, konversacioj! Dek neforgeseblajn tagojn!

Tanja Rajkova

aŭdos „La vojon“ de L. L. Zamenhof laŭ la optimismoplena, batalema melodio de nia samideano kaj juna komponisto Jordan Kolev. Li estas aŭtoro ankaŭ de la „Kanto de la fervojisto“ — vigla, gaja melodio pri tiu ĉi interesa profesio, kies ofta helpanto estas la Internacia Lingvo.

Subtila, iom trista kaj samtempe plena de soifo al la vivo, estas la melodio de la Zamenhofa „Ho, mia kor“ de Canko Kolev.

Parolante pri la enhavo de l' kolekto, ni ne povus preterlasi la demandon pri la vera nuntempa, junulara kanto — ĉu estrada, ĉu ĵaza, ĉu simple lirika. Ĝi ne estas reprezentita. Ne estas reprezentitaj ankaŭ multaj jam vaste konataj kaj amataj de la junaj homoj amasaj kantoj. Niaj gejunuloj-esperantistoj bezonas ilin. Kaj tio, laŭ mi, devas esti konsiderata ĉe eventuala nova eldono de la kolekto.

Nia dua propono rilatas al la tradukoj de la tekstoj. Ĝenerale ili estas sukcesaj, iuj

eĉ majstraj (ĉi tie ni havas antaŭvide „Vi estas bela, ho, arbar“, „Revo“, „La Danubo gaje bruas“, „Lulkanto“, „Florprintempo“ k. a. de Asen Grigorov; „Patrolando“, „Vekiĝu vi, popola am' fidela“, „Hej, Balkano kara“ k. a. de Stefan Kiragiev; „Ŝalmo ludas sur herbejo“ de Ivan Dobrev; „Estu ĉiam la suno“, „Buĥenvalda sonoro“ de K. Gusev k. a.).

Kelkloke tamen kun la muzika akcento ne koincidas la akcento en la traduko de „Haĝi Dimitro“, farita de Ivan Dobrev. Liberaj, kun iom artefarita vortordo, ofte malproksimaj de la originalo estas la tradukoj de St. Kiragiev al la popolkantoj „Akraj malbenoj“, „Pomuĵo ora“, „Iras jen...“.

„Flugas kanto tra la mondo“, krom la nobla deziro havigi al la esperantistoj novajn kantojn, havas, laŭ mi, ankaŭ alian valoron. Ĝi povus bonege faciligi la lernadon de Esperanto, disponigante kantojn al kursgvidantoj, kursanoj, aŭtodidaktoj k. a.

Venelin Mitev

POR LA MALGRANDAJ ESPERANTISTOJ

MIELO

de L. Jevsejeva

Miras panjo: jen okazo —
mankas la miel' en vazo.

Kiu ĝin formanĝi povis?

Kiu en bufed' ĝin trovis?

— Eble vi klarigos, Manjo? —
al filin' demandas panjo.

— Mi ne scias, — Manjo diras, —
ankaŭ mi pri tio miras.

Eble mia pluŝa urso
devojiĝis dum ekskurso,
veturante per la sledo
de kanapo al bufedo.
Eble ĝi enŝovis nazon
ĝis la fundo en la vazon,
ĉar miel', laŭ urso gusto,
estas, vere, tro bongusta.

KIO ESTAS LA SARDINO

— Nikolaĉjo, bonvolu diri, kio estas
la sardino?

— Jes, sinjoro profesoro. Ĝi estas
fiŝo, kiu vivas en oleo.

TRAVIDEBLA OBJEKTO

- Kion signifas travidebla objekto?
- Objekto, tra kiu oni povas vidi.
- Donu, mi petas, ekzemplon.
- La serurtruo.

El rumana: *Adrian Boldan*

LA MALSATA ARABO

Arabo perdiĝis en la dezerto. Jam tri
tagojn li vagas senespere tra la sablaro,
morte malsata. Ĉu li trovos ion por
manĝi kaj subteni siajn fortojn aŭ li
falos senpova kaj pereos en tiu sabla
maro?

Subite lia rigardo ekbrilas espere.
Jen loko, kie estas postsignoj de kara-
vano, ripozinta tie ĉi antaŭe. Sur la
sablo kuŝas malgranda leda saketo, ver-
ŝajne perdita. Li palpas. La saketo estas
plena de negrandaj objektoj. Certe dak-
tiloj aŭ nuksoj. Tio estas la savo. Kun
tremantaj manoj la arabo rapidas mal-
fermi la saketon. Ho malreviĝo! Interne
estis nek daktiloj, nek nuksoj — in-
terne estis nur perloj.

VORTLUDOJ

Kiu **turo** altiĝas kaj malaltiĝas?
Kiu **tero** estas super ni?
Kiu **aĝo** sanigas nin?
Kiu **rano** kantos?
Kiun **filon** oni vidas nur flanke?
Kiu **oro** estimigas la homojn?
Kiu **pano** estas trinkebla?

El „Der Esperantist“

KONCIZE

Esperanto-restoracio en Sofio. Dum la pa-
sinta jaro la Turista Sekcio „Esperanto“ ĉe
Bulgara E-Asocio direktis proponon al la urba
Komerca Entreprenejo „Zdrava Ĥrana“ („Bonk-
valita Manĝaĵo“) malfermi Esperanto-restora-
cion en la ĉelurbo. La estraro de „Zdrava
Ĥrana“ respondis jese al la propono, trovante
ĝin „bona, celkonforma kaj aktuala“. Ĉe re-
konstruo de la merkato la propono pri Espe-
ranto-restoracio estos antaŭvidita.

Similan bonsukcesan iniciaton la esperan-
tistoj povus realigi multloke.

Esperanto-korea vortaro. Nova Esperanto-
korea vortaro aperis en Seul. Aŭtoro estas la

prezidanto de Korea Esperanto-Junularo Tae-
keng Kim.

En la CK de BEA. La Estraro de CK de
Bulgara Esperantista Asocio akceptis Regula-
ron pri la organizado de Festivaloj de Bul-
gara E-Junularo. La Regularo estas dissendita
al la DK kaj E-societoj.

Dissendita estas ankaŭ Cirkulero N^o 1/1969
pri:

1. Elektado de bona materialo por la festi-
valaj repertuaroj.

2. Pri la Semajno de Internacia Amikeco,
„Interligilo“ — bulteno de l'Internacia Po-
ŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio, N^o 1/feb-
ruaro 1969, aperis en Sofio stencilita, kun
diversaj fakaj materialoj pri telefonio, telegrafio,
radio, filatelo kaj vivo de la esperantistoj
postistoj kaj telekomunikistoj. Adreso: Bu-
gario. Sofio — C, Poŝtenska kutija 25, IPTEA.



4000 MILIONOJN POR KONSTRUADO KAJ 160 000 MILK NOJN POR DETRUADO

La impostopagantoj de la Okcidenta Mondo kontribuas tie peze por milita „defendo“, ke relative nur malmulton oni donas por helpi la evoluon de la malriĉaj landoj.

Tion raportis antaŭ ĵurnalista kunveno en decembro Paul Hoffman, administranto de la Programo de Evoluado de Unuigintaj Nacioj (UNDP). Li rakontis, ke pasintjare 4000 milionojn da dolaroj el la mono de la impostpagintoj oni uzis por evoluigi malriĉajn landojn, dum 160 000 milionojn da dolaroj oni uzis por „defendaj celoj“.

S-ro Hoffman diris, ke tio povas esti priskribita kiel „4000 milionojn da dolaroj por konstruado kaj 160 000 milionojn da dolaroj por detruado“.

Tiujn milionojn la Okcidento elpezas el la mono, kiun ĝi forrabis de la malriĉaj landoj mem, kaj ilin denove uzas por detrui la pacan evoluon de tiuj samaj landoj, daŭrigante politikon de milito kontraŭ la popoloj de Azio kaj Afriko.

En ĵurnalo „Kooperativno Selo“ — Sofio (18. VII 1968): artikolo „Sen lingvaj baroj“ de Bulgara Telegrafinforma Agentejo estas substrekitaj la faktoj, ke dum la tagoj de la Nava Mondfestivalo de Junularo kaj Studentoj granda grupo de junaj homoj uzos kiel nuran interkomprenilon la Internacian Lingvon.

En ĵ. „Septemvrijako Zname“ — Kneŝa (5. XII. 1968): sub titolo „Dankon de la festvaroj-esperantistoj“ estas presitaj dankleteroj de S. S. Monov kaj Gjon Naji pro la sincera akcepto, kiun la junaj esperantistoj, partoprenintoj en la IX Festivalo de Junularo kaj Studentoj, trovis en urbo Kneŝa.

En ĵ. „Narodna Mladeŝ“, organo de CK de Komсомоло — Sofio (6. XII. 1968): raporto „Intereso al „Verda Raketo“ — pri la agado de la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en Vraca.

En ĵ. „Zarja na Komunizma“ — Loveĉ (12. XII. 1968): raporto pri celebra kunveno okaze de la naskiĝtago de Zamenhof en Loveĉ,

antaŭ kiu prelegis k-do Nikola Aleksiev, prezidanto de BEA.

En la sama ĵurnalo (24. XII. 1968): Raporto pri solena kunveno en Trojan dediĉita al la naskiĝtago de Zamenhof, antaŭ kiu prelegis k-do Lajju Lalev.

En ĵ. „Naroden Drugar“ — Jambol (28. XII. 1968): sub titolo „Sukcesoj kaj devoj“ — raporto pri la jara kunveno de E-Societo „M. Gorkij“ — Jambol.



Multloke en nia lando oni aranĝis solenajn celebroy de la 109-a naskiĝtago de Zamenhof. Sed pri tio aperis raportoĵoj aŭ eĉ tute simplaj sciigoj en tro malmulte da ĵurnaloj — centraj kaj lokaj, ankaŭ E-lingvaj. Ĉu similaj celebroy ne estas bona motivo por propagandi la eksteran publikon pri nia afero?

T. K. — Gorna Orjaŝovica: Ni dankas pro Via regul kunlaborado. Kiel vi vidas, iujn materialojn ni utiligas. Sed ĝis kiam vi preferos resti sub inicialoj? Ni petas, ne tenu nin plu en enigmo, malkaŝu Vian nomon kaj adreson!

Respondoj al la taskoj en numero 11 1968:

Prezeraroj — paĝo 12:

fiŝo — filo, pizojn — pirojn, polojn — pomojn, prusojn — prunojn, frakojn — fragojn, krado — kredo.

Kirloenigmo, p. 17:

La solvo: „VIZITU NIGRAN MARON“.

Helpvortoj: 1. Olivo. 2. Azilo. 3. Griza. 4. Tirso. 5. Atuto. 6. Knuto. 7. Tinko. 8. Agiti. 9. Karga. 10. Arabe. 11. Ebona. 12. Himno. 13. Amiko. 14. Odora. 15. Rompo. 16. Peono. 17. Kovno.

La kirloenigmon solvis: At. Gaev — Asenovgrad, J. Tomiŝek — ĈSR, P. Stoiĉkov — Sofia.

(la 10—20-an de aŭgusto 1969)

En tiu ĉi jaro jam la sesan fojon ni aranĝas la Internacian Esperanto-Seminarion en Szeged (Hungario), por pligrandigi la lingvajn, lingvistikajn, movadhistoriajn, literaturajn kaj metodikajn konojn de la partoprenantoj. La nombro de la partoprenantoj kutime estas 300—400 el ĉirkaŭ 15 landoj.

Sekcio „A“

Kursoj por komencantoj (bazo de E)
Kursoj por komencantoj, dezirantaj fari ekzamenon „A“

Sekcio „B“

Kursoj por tiuj, kiuj jam faris ekzamenon „A“.
Lernobjektoj: parolkapablo, gramatiko, literaturaj legaĵoj, movadhistorio.

Sekcio „C“

Kursoj por tiuj, kiuj jam havas atestilon „B“ kaj deziras akiri rajton por instrui Esperanton.
Lernobjektoj: lingvistiko, literaturhistorio, stilistiko, pedagogio, metodiko, provlecionoj.
Ankaŭ ĉi-jare gvidos la kursojn plej eminentaj geprofesoroj, fakuloj. Pri la ekzame-

noj, atestiloj kaj pri la detala programo ni sendos sciigojn al la partoprenantoj.

Partopreni povas la Seminarion ne nur pedagogoj. Por la infanoj ni aranĝos apartan programon.

Dum la nedevigaj posttagmezoj: vizito de la Hungarlanda E-muzeo kaj Biblioteko, prezentado de hungara popolensemblo ktp.

Venu kun viaj familianoj kaj Esperanto-amikoj al Szeged por distriĝi kaj plivastigi siajn E-konojn en vere internacia medio. Petu aliĝilojn de Internacia Esperanto-Seminario, Szeged, pf. 227.

Partoprenkotizo: 350 ft. Partoprenkotizo kun loĝado kaj manĝado: 1000 ft.

Loĝado en universitata kvartalo, en moderna studenthotelo, en 4-litaj ĉambroj (virinaj aŭ viraj). Apud ĉiu ĉambro estas lernoĉambreto.

Vi devas pagi la koncernan sumon aŭ rekte al nia ĉekkonto, aŭ sendigi la egalvaloran sumon en alilanda valuto tra banko al nia ĉekkonto ĝis la 10-a de junio 1969.

La egalvaloran sumon en alilanda valuto vi bonvolu sendigi al la Hungara Nacia Banko, kun noto: La sumo estas ĝirenda al la **ĉekkonto 2097—623, Szeged, Csengrád Dep. Kom. de la Hungara Esperanto-Asocio.**

ĉarma lando

Bela estas nia kara Patrolando. Kaj ne hazarde, sen troigi la belecon de ĝiaj variaj naturaj bildoj, la popola poeto Ivan Vazov verve skribis: „Kiu lando estas pli bela kaj pli riĉa ol nia!“

Kun entuziasmo parolis pri la impona ĉarmo de Bulgario milmiloj da alilandanoj, kiuj venas el ĉiuj partoj de la mondo por ripozi kaj ĝui ties belaĵojn. Ili ĉiuj konservas longedaŭrajn rememorojn kiel pri ĝiaj rimarkindaĵoj, tiel same pri la fama gastamo de la loĝantaro, pri la popolkutimoj kaj la belsonaj popolaj kantoj.

Kiu ne admiras la pentrindan panoramon de la iama bulgara ĉefurbo Ve-

NIA BELEGA PATROLANDO

liko Târnovo! Tion oni ne povas esprimi — dirus ĉiu gasto de tiu romantika belulo, se por unua fojo li direktus rigardon al la natura amfiteatro, kiu leviĝas sur la bordoj de la rivero Jantra. Kaj ne nur tie. Ni vere estas konsternitaj de iuj naturfenomenoj, kiaj ekzemple estas la pitoreskaj rokoj de Belogradĉik, konataj pro sia rara beleco kaj fabelaj kavernoj, ornamitaj per fantaziaj murdesegnaĵoj, stalaktitoj kaj stalagmitoj en plej strangaj formoj. Grandan intereson prezentas ankaŭ la riĉeco de historiaj monumentoj de kelkmiljaraj arto kaj kulturo. Niaj koroj estas obsedataj de nepri-skribebla ĝojo, kiam ni staras antaŭ la lazura Nigra Maro, aŭskultante la plaŭdadon de la ondoj kaj rigardante ilian rapidan kolorŝanĝadon. Ni sentas refreŝigan efikon, supreniĝante la kreston



de Rodopi — la montaro de la antikva kantisto Orfejo, kaj la majestajn masivojn de Rila, Pirin kaj de la legenda Balkano, kies faldoj similas grandegajn ŝtoniĝintajn ondojn en konkurado. Ne malpli rava estas la fekunda ebenaĵo Dobruĝa. Tie la blua horizonto ĉirkaŭas nin ĉiuflanke kaj ŝajnas, ke nur post iom da irado antaŭen ni palpos per mano la ĉielan kurtenon, falintan sur la oran tapiŝon de la senfinaj kooperativaj kampoj, ame kulturataj de la laborema bulgaro.

Nuntempe veturas tra la lando homoj diversaj laŭ nacieco, aĝo kaj profesio. Kompreneble, pro tio oni devas danki al la progresinta tekniko, al la forte disvolvita fervoja trafiko, al la asfaltitaj ŝoseoj kaj komfortaj aŭtobusoj, al la modernaj mara kaj rivera flotoj, kiuj disponas sufiĉe da pasaĝerŝipoj, ankaŭ al la rapidfluga aertransporto. Tion oni ŝuldas precipe al la plialtigita materiala kaj spirita vivnivelo de la laborhomoj kaj al la kulturaj interesoj de la vastaj popolamasoj en la libera Patrolando. Kaj antaŭ ĉio, dank' al la konstanta socialisma kresko en ĉiuj sferoj de la vivo, kiu allogas la laborulojn kaj inspiras ilin al novaj brilaj sukcesoj.

Hodiaŭ en nia lando estas multaj novaĵoj, kiuj aliigas la pejzaĝon. Okazis radikaliaj ŝanĝoj en la strukturo de nia socio, en la vivmaniero kaj en la aspekto de niaj urboj kaj vilaĝoj. Dum la lastaj jaroj elkreskis tute novaj industriaj centroj kiel Dimitrovgrad, Madan, Rudozem kaj m. a. — fieraĵo de l'socialisma konstruado. Jam la tuta lando estas sursemita de grandiozaj uzinaj korpoj kaj koketaj loĝblokoj, hidroelektraj centraloj kaj akvobaraĵoj, kiuj irigacias la fruktodonan kamparon — popolan posedaĵon. Sur niaj belegaj montaroj oni konstruis



dekojn da moderne ekipitaj montodomoj kaj oportunajn ripozejojn, kiuj akceptas multajn naturamikojn. Ankaŭ la nigramara bordregiono estas ornamita de pompaj ripozaj loĝkompleksoj kaj interesaj nacistilaj konstruaĵoj, luk-saj vilaoj kaj bone aranĝitaj hotel-restoracioj kun eleganta arkitekturo. Ili proponas perfektajn kondiĉojn por feriado kaj altiras multnombrajn somerumantojn. Per tiuj ĉi atingiĝoj nia plibeligita kaj pliriĉigita lando estas fame konata malproksime trans siaj limoj.

Ĉiuj ĉi naturaj aŭ kreitaj de la homo belaĵoj faras nian lumplenan landon ĝardeno, entuziasmigas ĉiun bulgaran koron kaj plenigas ĝin per pura patriota amo kaj fiero. Ĉiu bulgaro, juna aŭ maljuna, amas ĝin kaj gardas ĝin kiel la pupilon de sia okulo.

N. Tarakĉiev

Ĉefredakroro: Kunĉo VALEV

Redakta komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Atanas LAKOV, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV, Petr TODOROV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 83-26-82

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Grupo de novaj geesperantistoj inter 17—56-jaraĝaj deziras korespondi kun ĉi pri ĉt: Venetka Dimova Venkova (fraŭlino, 18 j.), Ganka Jordanova Ganeva (fraŭlino, 17 j.), Cvetanka Ĥristova Cvetkova (instruistino, 18 j.),

Kiril Petkov Radanov (fraŭlo, ŝoforo, 18 j.), Dimčo Kolev Dimov (fraŭlo, 20 j.), Kolju Conev Georgiev, (ekonomiisto, 46 j.), Ekaterinka Koleva Coneva (birdobredistino), Ljuba Todorova Aleksandrova (instruistino, 56 j.),

Savka Slavi Ivanova (kudristino, 50 j.), Dimitr Vārbanov (konstruisto), Trufka Genčeva Ĥristova (laborgrupestrino). Adreso valida por ĉiuj: selo Ĉerkovna, Razgradsko.

Atanas Dimitrov, Asenovgrad, ul. Ril-ska 8 — kun ĉ. l. pri ĉ. t.

Gjueŝevo — Kjustendilsko, Miĥail Koka-linski — 12—16 jaraĝaj gelernantoj kaj 19—30 jaraĝaj dtversprofesiaj geesperantistoj de-ziras korespondi kun la tuta mondo. Skribu al la supra adreso.

Italio

Novaj esperantistoj deziras korespondi serioze kun bulgaraj esperantistoj:

Trambajolo Giuseppe (50-jara, elementa instruisto), Via Centa 19, Schio — Vicenza.

Guiotto Terisina (22-jara, fraŭlino, kontistino), Via Conche 4, 36078 Valdagno — Vicenza.

Poteran Mariuccia (22-jara, fraŭlino, kontistino), Via Keplero 17, 36078 — Vicenza.

Moracchiato Laura (35-jara, fraŭlino, bankoficistino), Via A. Rossi 11, 36100 Vicenza.

Matteazzi Antonio (25-jara fraŭlo, poŝtisto), Via Murialdo 3, 36100 Vicenza.

Perin Bruno (26-jara, fraŭlo, studento de industria kemio), Via C. Colombo 8, 36078 Valdagno — Vicenza.

Stellin Erio (25-jara, fraŭlo, studento), Via Copernico 13, 36078 Valdagno — Vicenza.

Novaj esperantistoj-instruistoj deziras korespondi serioze kun bulgaraj instruistoj-esperantistoj:

Bernar Aldo (45-jara, elementa instruisto), Via Luigi Faccioio 39, 36100 Vicenza.

Canevarolo Elsa (40-jara, elementa instruistino), Via A. Rossi 11, 36100 Vicenza.

Cortese Maria Gemma (30-jara elementa instruistino), Piazza XX Settembre 4, 36100 Vicenza.

Migliori Maria Enza (25-jara, elementa instruistino), Via Lonigo 2, 36100 Vicenza.

Poter n Giovanna (25-jara fraŭlino, elementa instruistino), Via Keplero 17, 36078 Valdagno — Vicenza.

Forestan Giovanna Maria (40-jara fraŭlino, instruistino), Via Garibaldi 58, 36043 Camisano Vicentino (Vi).

Greselin Aldo (60-jara, Instruisto en meza lernejo), Lesina di Sopra 19, 36014 Santorso — Vicenza.

Lattanzio Rosanna (25-jara, fraŭlino, instruistino), Via IV Novembre 48, 36070 Trissino — Vicenza.

Lattanzio Vincenzo (27-jara, fraŭlo, instruisto, ankaŭ sportisto), Via IV Novembre 46, 36070 Trissino — Vicenza.

Marchioretto Antonio (47-jara, instruisto), Via Colleoni 20, 36016 Thiene — Vicenza.

Trentin Umberta (37-jara, diplomita instruistino), Via S. Pietro 46, 36100 Vicenza.

Pollando

Gelernantoj deziras korespondi kun in'anoj pri sporto, muziko, filmoj kaj interŝanĝi pm, pk, fotojn de aktoroj:

Roman Kak (12-jara), str. Chopina 3/3, Bydgoszcz.

Rycerz Ewa (13-jara lernantino), str. Wycotkowskiego 17/4, Bydgoszcz.

Ilona Pipien (20-jara) Cieszyń, str. Bielska 4/16 — kun ĉi pri ĉt.

Grązyna Kmiec (19-jara), Wrocław IX, ul. Mianowskiego 5 — kun ĉi.

Barbara Kraks (18-jara), Inowrocław, ul. Mardiewskiego 28/4 — kun ĉi.

Kazimier Przybyła (18-jara), Kępno, ul. Sienkiewicza 9, woj. Poznańskie — kun ĉi.

Romuald Jalowiecki (37-jara, instruisto), Kielce, ul. Jesionowa 4, m 34 — kun ĉi pri ĉt.

Halina Pindov (21-jara, studentino), Legnica, ul. Srodkowa 82/83 m 20, woj. Wrocław — kun ĉi.

Emil Majewski (35-jara, oficisto), Jaworzno II, ul. Kosciuszki 7, woj. Kraków — kun ĉi.